La Esperanto-Gironde Informilo

LEGI

FEBRUARO 2023

N° 170

# Vintraj vizitantoj



# ESPERANTO-GIRONDE
# KUNVENO en Espace Simone Signoret en CENON
# la 11an de DECEMBRO 2022
# je la 10a 45

Ĉeestas: Annie Brilleaud, Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Gloria Gargallo, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie kaj Rose Sarlandie

Senkulpigitaj: Katya Gradzion, Fernando Torres

**Elvezio** salutas kaj dankas la ĉeestantojn.

## 1. Vivo de la asocio

**Jean-Seb** petas, ke oni sendu al li la paperan version de LEGI.

**Elvezio** dankas al Yannick pro la translokado de la libroj al Kvinpetalo.
**Yannick**: Ekzistas katalogo de la bibliotekoj en Kvinpetalo.
**Marcelo**: Restas tuta ŝranko. Transportis tri skatolojn plenajn je Esperantaĵoj (malnovaj libroj, diskoj ktp) por disdoni.
En Angers, ĉeestis asocioj de Le Mans, Angers, Nantes, Tours (ĉirkaŭ 50 personoj).
**Klodin'**: Ni havas iomete pli da tempo por malplenigi la lastan ŝrankon. Ni ricevis ĝis nun neniun respondon, ĉu ni rajtas havi lokon por la lasta ŝranko, ĉu ni rajtas havi sidejan adreson en la urbodomo.



**Marcelo**: La kursoj okazas en la mediateko. Ne eblas meti tien la ŝrankon. Ni petis havi ŝrankon aŭ parton de ŝranko en la biblioteko. Por la direktorino de la biblioteko, ne estus problemo se la poŝtaĵoj por Espéranto-Gironde alvenus al la biblioteko. La kunvenejo estos salono Simone Signoret, kiam ĝi estas libera.
**Martine**: La salono por la lundaj kursoj estas granda. Partoprenas 5 personoj. Fernando venis unu fojon, Domingos venas unu fojon monate. La grupo estas tradukanta novelon de Annie Ernaux, *L'Homme de la poste*.
**Elvezio**: Du lernantoj partoprenas en la kursoj en universitato.

### 2. Brasensa kanzonlibro

**Marcelo**: Estis liverita kvindeko da libroj plenaj de preseraroj. Ili estas neutiligeblaj. La senerara eldonaĵo ne alvenis. En Angers li prezentis la prelegon. Li kaj Serge kunportis siajn stokojn (7), kiuj vendiĝis, sed neniu faris mendon.
La eraraj libroj estas disdonitaj, por ke ĉiu el la nunaj ĉeestantoj ilin forĵetu.
La 50 ekzempleroj kiel «labordokumentoj» estos la lastaj.
**Yannick**: Ĝis nun neniu novaĵo pri Warner. Li eble telefonos venontsemajne.

### 3. Aliaj demandoj

**Joël**: La kursoj en Galgon ne plu okazas. Dum kelka tempo la grupo kunvenis en asocia kafejo Les troubadours en Libourne. Poste tio ne plu eblis pro la sansituacio. Les troubadours akceptis ilin unu fojon monate dum 6 monatoj.
La grupo de Créon kunvenas unu aŭ du fojojn monate en kafejo por montri, ke Esperanto ekzistas.

**Martine**: Ĝis nun 13 aliĝintoj al Esperanto-Gironde.

**Bernardo:** Vizitos la venontan UK en Torino. Cetere li kontaktis la arkivejon kaj ricevis respondon de Violaine, kiu petis la liston de la enhavo. Li sendos ĝin.

Je la 12a15 alvenas Hervé, lernanto de Elvezio, kaj antaŭ la tagmanĝo alvenas Jean-François, alia lernanto de Elvezio.

**Klodin'**: Okaze de la kunveno en Angers, Katya prezentis sian prelegon pri Ukrainio dum ĉirkaŭ 50 minutoj. Ŝi celis klarigi la fontojn de la nuna situacio: konfuzo inter «Rusio» kaj «Rutenio» en multaj tradukoj, kaj tion ekspluatas Putin'. La historio de Ukrainio estas tre komplika.

**Marcelo**: Katya registriĝis ĉe la prefektejo sed estis eraro en la kreo de ŝia socialasekura numero. Tial daŭre estas misoj kaj Pôle Emploi rifuzas registri ŝin, ĉar aperas eraro inter la naskiĝdato kaj la socialasekura numero. Marcelo resendis kompletan dosieron al la prefektejo. Sed pasintan semajnon alvenis al Katya letero, en kiu la sociala asekuro petas de ŝi sian oficialan naskiĝdokumenton en la ukraina. Feliĉe, ŝia patrino povis ĝin sendi.

Posttagmeze Marcelo partoprenigas nin en aranĝoj pri la florslipoj.

La kunveno finiĝas je la 16a.

*Janine*



# BIRDOJ EN MIA VINTRA ĜARDENO



Ĉiujare, kiam ekvintras, mi kutimas instali birdmanĝujon, birdtrinkujon kaj kelkajn grasaĵbulojn en arbeto proksima al la fenestro de la skriboĉambro. Tiel, kiam ili alflugas, mi povas ilin observi kaj foti.

Fronte al la kuireja fenestro keskas laŭro, en kiu ĉi-jare mi pendigis sufiĉe grandan grasaĵcilindron.

Mi longtempe ne konsciis pri la sufiĉe granda diverseco de la birdaro, kiu frandas la manĝaĵojn, kiujn mi proponas.



La plej fruaj kaj multnombraj estas la bluaj paruoj. Tiuj ĉi frandas kaj la sunflorgrajnojn kaj la grasaĵbulojn. Interese estas observi iliajn vivmanierojn: malsata blua paruo ĝisflugas la cilindran manĝujon. Tiu havas ses truojn, ĉiu kun horizontala stangeto, sur kiu birdo povas stari por beki grenojn. Blua paruo rapide surflugas stangeton kaj, bekinte unu grajnon, tuj reekflugas al arbobranĉo, por ĝin rompi kaj gluti.



Malan sintenon havas kardeloj, kiuj ĵaluze restas sur siaj stangoj kaj malamike atakas per krio aŭ flugatako ĉiun ajn alian birdon, kiu montras emon aliri la manĝujon, eĉ alian kardelon. Kardelo povas okupi manĝujstangon dum pluraj minutoj. Aliaj birdoj ĝenerale profitas neatentomomenton por tuj surflugi kontraŭan stangon, tiel ke ili ne estu vidataj de la egoisma tedulo.

Ankaŭ la trinkujon-banujon plej ofte vizitas la bluaj paruoj, pli malofte la kardeloj. Kardeloj ne volonte vizitas la grasaĵbulojn.

La grandaj paruoj estas malpli multnombraj. Iliaj moroj estas tre similaj al tiuj de la blua paruo. Ofte ili ne venas je la samaj horoj, kiel la bluaj, iom pli malfrue en la tago.



Aliaj birdoj pli malofte vizitas nian «restoracion»: pronelo (prunella modularis) sufiĉe frandas la ĝrasaĵbulojn, same kiel sito (sitta europaea), tre eleganta birdeto, kun sia spindelforma korpo, sia rufa brusto, sia grizblua dorso kaj siaj zorge nigre ŝminkitaj okuloj. Mi ŝategas observi siton, kiam ĝi rapidege supren- aŭ malsuprengrimpas arbotrunkon, kiel museto.





Pluraj birdospecioj ne ŝatas alte sidiĝi sur la manĝujstangoj. Do ili atendas, ke grajnoj falas surgrunden por ilin beki. Tiel kondutas ekzemple la rubekolo, kiu kelkfoje tamen surflugas kaj bekas la grasaĵbulojn. Singularo tute taŭgas por rubekolo, ĉar maloftege mi vidis du sur la sama loko en la ĝardeno. Kiam unu ekkonscias, ke apudas rivalo, ĝi tuj agreseme alflugas ĝin. Ankaŭ rubekolo estas birdo tre ĵaluza pri sia teritorio. LA rubekolo, kiu okupas nian ĝardenon, frandas ankaŭ la ĝrasaĵcilindron. Ĝi estas preskaŭ la nura birdo, kiu ĝin pikas, escepte de kelkaj bluaj paruoj.



Ankaŭ pluraj specioj de fringoj preferas manĝi surgrunde: precize nomita fringo (*fringilla coelebs*), verda fringo (*chloris chloris*), montofringo (*fringilla montifringila*), kiu havas tre vivan buntan plumaron. Ĉiuj-ĉi specioj tre simple kunvivas, ne atakante unu la aliajn dum la komunaj manĝoj.

Kelkfoje aperas paseroj, sed ili estas malmultnombraj.







Pli grandaj birdoj esperas, ke restas iomaj manĝaĝoj por ili: tial vizitas la manĝ-areon turtoparo, pri kiu tute fajfas la malgranduloj. Turdo kaj merlo venas unuope. Plejofte temas pri virmerlo kun sia bela nigra plumaro. Vintre turdo kontentiĝas per grajnoj, sed, kiam revenas printempo, ĝi frandegas helikojn, kiujn ĝi kaptas, kaj kies konkojn zorge frakasas sur malmola surfaco, por gluti la internaĵon.







Iun fojon alvenis malgranda grupo da sturnoj, kiuj reforflugis apenaŭ surgrundiĝinte.



Pasintan vintron, ni surprize vidis en la ĝardeno splendan fazanon, bedaŭrinde tutcerte el bredejo por ĉasaĵoj. Mi esperas, ke ĝi supervivis la ĉassezonon…



Sur la granda herbejo malantaŭ nia domo preskaŭ ĉiutage ĉirkaŭ tagmezo alteriĝas aro da egretardeoj (ni kalkulis ĝis dudeko da ili). Ili verŝajne pasigas vintron ĉe proksima lageto antaŭ ol reflugi norden, ĉar ni ne vidas ilin dum somero.





Kelkfoje alvenas birdo, kiun mi ne konas aŭ rekonas. Miaj ĉitemaj libroj ne ĉiam helpas, ĉar la birdo tro rapide forflugas, aŭ la foto estas malpreciza.

Sed dekduo da specioj estas sufiĉe kontentiga atingo, kaj igas min esperi, ke miaj zorgoj favore al la birda popolo helpos ĝin plu prosperi.

*Janine*

# Ĉu vi konas CHATGPT?

https://openai.com/blog/chatgpt/



*Nils malkovrigis al ni tiun programon hieraŭ vespere. Se vi ankoraŭ ne provis ĝin, vi tuj faru. Ĝi mirigas ĉiujn, kiuj ekuzas ĝin kaj do ekkonscias pri la vasteco de la afero. Pri la bonoj kaj malbonoj konstateblaj, ni bezonos iom pli da tempo.*

*Al tiu redaktomaŝino, vi pridemandu ion ajn. Multlingva kaj multscia, ĝi respondas al viaj ĝeneralaj aŭ plej detalaj kaj precizaj demandoj. Ĝi kapablas disertacii helpe al studentoj, verki dungopostulan leteron, eĉ romanon por seninspira aŭtoro… ankaŭ artikolo por LEGI, ĉar komprenebl ĝi regas esperanton.*

Tiel mem sin prezentas la programo:
Ni trejnis modelon nomatan ChatGPT kiu interagas en konversacia maniero. La formato de la dialogo ebligas al ChatGPT respondi sekvajn demandojn, agnoski siajn erarojn, defii malĝustajn antaŭsupozojn, kaj rifuzi maladekvatajn petojn. ChatGPT estas fratmodelo de InstructGPT, kiu estas trejnita sekvi instrukcion en saluto kaj provizi detalan respondon.

*Mi tajpis:*
artikolo 1000 vortoj pri vivĝojo en Bordozo

*CHATGPT tuj ekskribis sur la ekrano la ĉipostajn 1000 vortojn aperintajn literon post litero. Kaj post 10 sekundoj eblis legi:*
Vivĝojo estas esenca elemento por atingi feliĉon kaj atingi bonan vivon. En Bordozo, urbo en suda Francio, ekzistas multaj manieroj por trovi vivĝojon kaj ĝui la belecon de la regiono. Unu el la plej bonegaj manieroj por trovi vivĝojon en Bordozo estas tra la regiona kuirarto. Bordozo estas fama pro sia vino kaj fromaĝo, kaj la regiono ankaŭ estas riĉa je aliaj delikataj manĝaĵoj kiel foie gras kaj la tradicia "magret de canard" (ankaŭ konata kiel ankaŭfileto). Krome, Bordozo estas hejmo de multaj famaj restoracioj kaj bistroj, ofertante la perfektan okazon por degusti la lokan kuirarton kaj ĝui vesperon kun amikoj aŭ kunulo.
Alia maniero por trovi vivĝojon en Bordozo estas tra la regionaj vinberkultivado kaj vinproduktado. La regiono estas konata pro siaj riĉaj vinberkampoj kaj la produktado de famaj vinoj kiel Saint-Émilion kaj Pomerol. Viziti la vinberkampojn kaj partopreni vinproduktadon povas esti bela sperto kaj ebligi al vi pli bone kompreni kaj aprecii la arton de vinproduktado.
Naturamikoj ankaŭ povas trovi vivĝojon en Bordozo tra la multaj naturaj allogaĵoj de la regiono. La ŝoseo de la vinberkampoj, la "Route des Vins", estas bela vojo por aŭtoĝiro tra la vinberkampoj de Bordozo kaj la ĉirkaŭaj regionoj. La urbo ankaŭ estas hejmo de la Garonna rivero, kiu ofertas multajn eblecojn por naĝado, kanoado, kaj aliaj akvaj sportoj.
La kultura vivo de Bordozo ankaŭ estas riĉa kaj varia, kun multaj muzeoj, teatroj,

kaj koncertoj ofertantaj eblojn por distro kaj kultura eduko. La urbo estas hejmo de la fama Musée d'Aquitaine, kiu prezentas la historion kaj kulturon de la regiono, same kiel la Musée des Beaux-Arts, kiu havas imponan kolekton de arto de la Renesanco ĝis la nuntempo.
Krome, Bordozo estas hejmo de multaj festoj kaj eventoj dum la jaro, kiel la Festival de Musique, la Fête du Vin, kaj la Fête de la Fleur, donante al vi multajn

*Nu, ja pri la enhavo de la respondo kelkaj informoj restas konfirmendaj, kelkaj vidpunktoj kontestindaj. Tamen se mi konsideras la ĝeneralan rezulton, mi restas surprizita, mirigita kaj en pripenso pri la nekredeblaj aliroj de tiaj programoj… kaj tio vertiĝe turnas mian kapon!*

*Marcelo*

Citaĵo de.... **Viktoro Hugo**
*(Bezansono 1802 - Parizo 1885)*

Le poète en des jours impies
vient préparer des jours meilleurs.
Il est l'homme des utopies;
les pieds ici, les yeux ailleurs.

*Les rayons et les ombres, fonction du poète*

Poeto dum tagoj malpiaj
preparas pli bonajn horojn.
Jen homo de l' estoj utopiaj;
Piedoj tie, okuloj en forojn.

*La radioj kaj la ombroj, funkcio de l' poeto*
*tradukis Marcelo*



## RAKONTETO *(Gloria)*

Macron suferas akcidenton sur strato. Li falas senkonscia kaj restas en komato ĝis 2040.
Kiam li vekiĝas, li decidas foriri ĝis strato kaj li sin sentas bone. Li eniras kafejon kaj petas tason da kafo; kaj li konversacias kun la servisto:

- Kiel vi fartas?
- Bone, tre bone sinjoro.
- Mi ĝojas. Kaj kiamaniere finiĝis la milito en Ukrainio?
- Ho, tre bone, ni estas tre kontentaj!
- Ha, ankaŭ mi kontentas. Nu, kiom mi ŝuldas por la kafo?
- 2 rublojn!

# UKRAINAJ STUDENTOJ STRIKAS




Sabaton la 12an de novembro 2022 en Lvivo okazis studenta manifestacio kontraŭ fermo de la akademio pri presarto en Lvivo.

La ministerio pri Edukado kaj Sciencoj de Ukrainio preparis senmotivan dekreton pri la estonto de la ukrainia akademio pri presarto en la nacia universitato Ivan Franko Lviv, sen averto, nek konsento de la studentoj kaj dungitoj de la akademio. Tia decido meze de akademia jaro ne kontribuas al altkvalita instruado de la studentoj en ĉiuj fakoj koncernataj de la militjuro, kaj reage kaŭzis kontraŭstaron de la studentoj kaj de la dungitoj de la akademio.

Jen vola politiko celanta detrui la ukrainian eduksistemon. Tiel en majo 2021 la administra konsilio de unu el la strukturoj de la Monda Banko aprobis monpruntedonon je 200 milionoj da dolaroj kontraŭ revizorado de la ukrainiaj universitatoj cele al ilia kunfandiĝo aŭ fermo. La reformo koncernas la 150 plej grandajn ŝtatajn universitatojn. Laŭ plano de la ukrainia ministerio pri Edukado kaj Sciencoj plurestus ne pli ol 80 institucioj pri supera klerigado.

La akademio pri presarto de Lvivo ne estas la unua viktimo de tiu reformo. Jam en decembro 2020 studentoj kaj profesoroj de la nacia universitato pri konstruado kaj arkitekturo de Kharkivo manifestaciis kontraŭ la fermo de sia universitato.

Samkiel por la nacia universitato pri konstruado kaj arkitekturo de Kharkivo studentoj manifestaciis kontraŭ la fermo de sia universitato, ĉar, laŭ fidindaj fontoj, investanto premegis por fermo de la institucio, cele al akiro de la grundo apartenanta al la akademio.

Konsekvence, ne la milito kaŭzas la fermon de la universitato, ĉar ĝi ĉiamaniere pretiĝis. La detruo de la infrastrukturoj de la nacia edukado generos malpliigon de la nombro da specialistoj kaj tiel inklinos al ruinigo de la landa ekonomio.

Eble ŝajnas strange, ke la Ŝtato engaĝiĝis en iun formon de memdetruo. Tamen ĝi bone rolas sian funkcion kiel reprezentanto de la interesoj de la loka kaj ĉefe internacia kapitalo:

-1/ la unua neceso estas produkti krudmaterialojn, kaj ne konkurentojn en la industrioj kun forta scienca denseco.
-2/ la dua motivo estas la tuja profito. Funkciuloj ricevas koruptaĵojn kaj estas subtenataj de entreprenoj.
-3/ La interesoj de la socio ne aperas en tiu afero.

Dum la studentaj manifestacioj aŭdeblis tiaj sloganoj: «Studentoj estas devigataj manifestacii dum la milito!», «Ne kreu internajn malamikojn!», «Kiuj sinkigas la ŝipon, ne estas, kiuj luktas por siaj rajtoj, sed kiuj daŭrigas politikojn kontraŭ laboristoj kaj kontraŭ la socio».

Ni povas ĉiuj plu silenti kaj suferi, jaron post jaro, perdante ĉiun esperon pri pli bona estonto. Aŭ sekvi la ekzemplon de la studentoj en Lvivo kaj eklukti jam nun kaj ĉi tie.

La studentoj kaj profesoroj de ĉiuj ukrainiaj universitatoj pretas subteni la kampanjon, ĉar ankaŭ ili baldaŭ suferos «optimumigon» de sia universitato.

Partigu tiun informon per sociaj retoj. Nur dank’ al dissciigo kaj solidareco eblos haltigi tiun atakon kontraŭ la ukrainia socio!

Vivu la akademio pri presarto en Lvivo!

*Publikigita de la retejo la Socia Movado [Sotsialniy Rukh.](#)*

*Al la franca tradukis Patrick Le Tréhondat kaj al Esperanto Marcelo.*



# ALVOKO AL SOLIDARECO KUN LA UKRAINAJ GESTUDENTOJ

La rusa armea invado en Ukrainio kreis ne nur terure malfacilegan politikan kaj ekonomian situacion, sed ankaŭ profundan humanan kaj socian krizon. Sub bombardado de raketoj kaj eksplodoj de pafoj, milionoj da Ukrainoj devige forlasis sian hejmon, sian labor- kaj stud-lokojn, serĉe ŝirmejon malpli danĝeran. Inter ili, centmiloj da gestudentoj. Jam ekde la unuaj monatoj de la milito estis detruitaj multegaj ligoj inter organizoj, sindikatoj kaj aliaj reprezentadoformoj de studentoj. Plejparte ili restis en la lando entute izolitaj, aŭ en eduk-strukturoj senrimedaj. Kelkaj foriris eksterlanden, dum aliaj fuĝis per propraj rimedoj el la teritorioj rapide okupitaj. Multaj rekrutiĝis ĉe rezistantaj rotoj, kiel ekzemple grupoj de la teritoria defendo. Nur nun[1] ni komencis ricevi pli detalajn informojn pri iliaj situacio, ĉiutagaj defioj kaj helpokrioj.

La plej grava problemo por la ukrainaj studentoj nuntempe estas la kostoj rilate al iliaj universitataj loĝejoj, por kiuj multaj ŝulde monpruntegis. Kvankam en multaj ukrainiaj regionoj estas praktike tute ne eble ĝui la loĝservon en la universitataj dormejoj pro la okazanta milito, kaj kvankam plejparto de tiuj, kiuj tie antaŭe vivis, jam delonge forlasis la lokojn, la studentoj troviĝas en devigo plupagi la luprezon de sia loĝejo, kiun ili ne plu okupas. Ofte al tiuj kostoj aldoniĝas minacoj forĵeti rubujen iliajn personajn aĵojn, kiujn ili haste forlasis en sia ĉambro, eĉ pri definitiva interrompo de iliaj studoj en supera lernejo, aŭ pri rifuzo pri aljuĝo de diplomo. Nu, kvankam la leĝoj de la lando favoras la studentojn (eĉ se nek universitatoj, nek kampusoj kapablas adekvate disponigi tiujn servojn), la socialajn aferojn, inter kiuj la loĝado, ignoras la aŭtoritatoj.

Krom la kostoj de la universitataj loĝejoj, la studokostoj estas doloriga problemo por multaj. Medikamentoj, nutraĵoj, vestaĵoj kaj kuracado enlistiĝas inter la ĉefaj elspezoj de la ukrainaj studentoj, kiuj plej ofte ne plu havas la necesajn rimedojn, por ĉiujn alfronti. Nur malmultaj superaj lernejoj pretas kunhelpi kaj prokrasti la pagojn de la universitataj kostoj, tiel ke multaj studentoj pretas forlasi siajn studojn, sen ricevi la diplomojn, por kiuj ili jam elspezis gravajn sumojn en la lastaj jaroj. Konsekvence ilia profesia estonteco en postmilittempa Ukrainio, kie industrio estas detruita, iĝis tre malcerta.

La milito kaj la malkapablo de la ukrainaj aŭtoritatoj solvi la socialajn kaj humanajn krizojn kaŭzitajn de la milito alportis ne nur ĥaoson en la vivon de la ukrainaj studentoj, ili ankaŭ kreis novan malfacilan realaĵon, estigante problemojn, kiujn la studentoj mem ne povas solvi. Ni, organizo de ukraina maldekstrularo *Соціальний рух (Sotsialniy Rukh / Socia Movado)*, alvokas al internacia solidareco en tiuj malfacilaj tempoj kaj proponas, ke kuniĝu vi al ni por monkolekti donace al humana helpo favore al bezonantaj ukrainaj studentoj.

Nia plej potenca armilo estas solidareco!

*Соціальний рух (Sotsialniy Rukh / Socia Movado)*
Por kontakto: Katya Gritseva, de27ad00@gmail.com

———————————————————————————————

[1] Lvivo, julio 2022

# ESPERANTO-GIRONDE
# KUNVENO en Espace Simone Signoret en CENON
# la 22an de JANUARO 2023
# de la 10a ĝis la 16a

Ĉeestas: Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Martine Edelbloude, Gloria Gargallo, Katya Gradzion, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose Sarlandie
Senkulpigitaj: Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucienne Laroche, Dominiko Martins



**Elvezio** bonvenigas ĉiujn kaj bondeziras sanon kaj ĉion bonan por la tuta jaro.
Li anoncas, ke la 2 lernantoj de la universitato, partoprenintaj en la antaŭa kunveno, pretas aliĝi al la grupo.
**Klodin'** demandas, ĉu ekzistas favora prezo por studentoj.
**Ĵanseb** favoras kaj proponas 5€ por studentoj, kiuj ne laboras.
**Elvezio** precizigas, ke Hervé Giraton kaj Jean-François Seleyre, laboras kaj vizitas la kurson en la universitato sed mem ne plu estas studentoj. Krome vizitas la kurson ankaŭ nova lernantino: Kate Davis (el la pesaka koruso). Ŝi pli frue eklernis sed tute forgesis kaj deziras relerni.
**Martine**: Ankaŭ Domingo decidis aliĝi. Do jen 20-opa grupo!
Martine legas la afablajn bondezirojn de Yvette Canut (Lacanau). Yvette salutas kaj bondeziras. Ŝi raportas pri la Billet d'humeur de France Culture la 25an de decembro.
**Elvezio** ricevis la ligilon kaj ĝin ŝutis sur la blogon de Espéranto-Gironde.

**Martine**: Kion fari, por ke la novaliĝintoj restu? Ĉu la kunvenoj plu estas en la kutimoj de la gejunuloj?
**Bernard**: Proponi la postenon de kasisto *(ŝerca ekrido!)*.
**Marcel** parolas pri persona sperto. Laŭ li necesas aŭdi kaj aŭskulti la projektojn de la gejunuloj, kaj celo de la grupanoj estu helpi al iliaj realigoj. Li parolas pri propraj spertoj, kiel liajn projektojn apogis tra la jaroj la samgrupanoj, jen por organizado de eventoj, jen por spektakloj de La Kompanoj.
**Ĵanŝeb** aprobas.
**Gloria** kaj **Bernardo** memoras, ke ankaŭ ili partoprenis kun Léo en kampanjoj kiel *Espéranto au bac* gluinte afiŝojn.

**Elvezio** bonvenigas la alvenon de Dominiko kaj lian kompetentan eklaboron pri la blogo. Li unue rimarkis la problemon pri la «hakita» (retpiratita) retejo. Yannick povis restabiligi la aferon kaj Dominiko jam enretigis plurajn rubrikojn. Grava helpo.

**Elvezio** precizigas la aludon de Yvette pri la jula elsendo de France Culture. Ĝi nomiĝas *Superfail* (fiaskego!). Do ne objektive sed pli ironie la ĵurnalistino prezentis Esperanton. Elvezio rebatis. Li plusendos la ligilon.
**Ĵanseb** kontraŭ tiu malfavora prezento proponas komunan rebaton.
**Bernardo** memoras, ke ankaŭ li sendis mesaĝon al Constance, humuristino, kiu iam ironie prezentis E-on ĉe Radio France. La postan semajnon ŝi respondis dum la elsendo, ke ŝi ricevis multajn reagojn.
**Bernardo** ankaŭ memoras, kiam Pierre Desproges, rakontis per sia persona humuro pri la homo en la rivero krianta «O sekuron!» antaŭ ol esti formanĝita de krokodiloj.

Responde al Elvezio **Klodin'** donas novaĵojn pri Palmer. Aŭ pli ekzakte pri la stagna situacio tie. Ni nepre bezonas trovi lokon por konservi la enhavon de la lasta plenŝtopita ŝranko, kiam oni signos al ni.
**Bernardo** daŭre atendas la konvencion por la arkivo, kiun Violaine diris, ke ŝi poŝte sendis. Tamen ni ne scias al kiu adreso. Do Bernardo devos peti de ŝi novan konvencion. Dum la atendo arkivotaj dokumentoj restadas en la Sarlandie-hejmo.



**Katja** raportas pri la kunveno lastan lundon en la mediateko de Cenon kun Valentyna kaj Volodimir. Ni parolis pri Ukrainio kaj situacio de la Esperanto-movado en Kijivo. La tieaj esperantistoj frontas al malfavoraj kondiĉoj por kunveni. Tamen restas interŝanĝoj per telefono.
**Elvezio**: Ĉu danĝera lingvo?...
**Katya**: Male, ĝi estas la plej facila, kaj estus bone, ke ĉiuj konu, scipovu ĝin.
Bedaŭrinde nur Andreo krome povis partopreni en la interesa diskuto. **Martine** tre bedaŭras, ke ĝuste tiam ŝi ne estis libera. Efektive, laŭ **Klodin'**, ĉiam estas interese aŭdi la lingvon prononcitan de eksterlandanoj.
**Elvezio** deziras scii, ĉu delonge Valentyna kaj Volodimir esperantiĝis.
**Katja**: Mia bopatro de tre longa tempo kaj mia patrino en 2008. Li instruis al ni Esperanton. Mi ekinteresiĝis, kiam mia patrino lernis du aŭ tri lecionojn kaj poste mi sekvis la kurson kun ŝi. Katja bedaŭras, ke vivas tro malmultaj esperantistoj en Kijivo. Sed ili estas interesaj.

**Bernardo** kondolencis al Céline Bernard pro la forpaso de Francis Bernard, ŝia patro, redaktoro de Espéranto-Info. Al tiu grava kaj bela revuo li abonigis la mezlernejon, kiun li estris! Ankaŭ **Marcelo** kaj **Klodin'** kondolencis al Céline.

Pri Brassens: Ni ricevis la menditajn 50 librojn en du sendoj plus la lastan fakturon.
**Martine** rimarkigas la kvazaŭsaman sumon por 50, kiel antaŭe por 100.
**Klodin'** proponas sendi al Martine Demouy menditan ekzempleron sen postuli kromajn sendokostojn.

**Ĵanseb** reparolas pri la enigmo rilate la malaperon de la Eŭropa Himno post nia lasta kunveno. Tiun belan dokumenton neniu retrovis. **Klodin'** proponas kiel solvon reprodukti novan afiŝon je kosto de la asocio. Plastizado kostis 32 € en 2019.

**Gloria** ĵus legis libreton de George Orwell, kie la aŭtoro parolas pi sia onklino kaj ŝin priskribas kiel esperantistinon, vegetaraninon kaj pacistinon. Sed li ne diras, ĉu li lernis Esperanton en tiu epoko.

**Bernard** kaj **Rose** aliĝis al UK en Torino fine de julio.

**Elvezio** montras libron eldonitan en la hispana pri la historio de Eo-movado en Hispanio: *Lengua y utopia*. Li donacis ĝin al kolego, fakulo en la universitato.
**Bernardo** iam aĉetis en Kubo lernolibron en la kimra lingvo kaj sendis al sia kimra amiko. Sed dubas, ĉu ĉi lasta iam eklernis.



Ne diru, ke la halo malvarmegas, sed ke ni ne suferis pro varmego! (Jean-Seb)

**Marcelo** anoncas prelegojn en Tours la 4an de marto. Katja prezentos Ukrainion, Klodin' kaj Marcelo sovaĝajn florojn.

ChatGPT: Rilate tiun robotaĵon, **Elvezio** printis la raporton senditan de Marcelo kaj miras pro la rezulto (vd p.7). Tute senerara. Klodin' aludas pri raporto de instruisto koncerne notojn atribuitajn al taskoj pli altajn al la roboto ol al lernantoj. **Ĵanseb** parolas pri la testo de Turin provanta defini, kiu verkis, ĉu roboto ĉu dupiedulo. Paralele esploristoj provas krei programojn kapablajn distingi, ĉu tekstokreinto estas homo aŭ maŝino.
**Klodin'** deziras submeti al tiu maŝino la unuan filozofian taskon, kiun ŝi devis fronti en la liceo, kaj rakontas, kiel ŝi suferis fronte al nebula vetero trans la fenestro kaj ŝia kajera paĝo, kiu senesperige restis muta: «Regret, remords, repentir» (Bedaŭro, rimorso, pento!) Vi disponas pri tri horoj, ChatGPT konkludos post 10 sekundoj!

**Venonta kunveno 19an de februaro 2023,** en salono Simone Signoret.

La tagmanĝon iom pli rapidan ol kutime (pro la nehejtita halo) kronis tradiciaj reĝkukoj kun faboj sed sen krono!

Posttagmeze **Marcelo** prezentis Ptaŝkan, ukrainan ŝtalbirdon. Per fotoj kaj komentoj, la grupanoj ekkonis la neordinaran vivon de junulino, kiu fulmrapide iĝis heroino. Komence talenta artistino (teatro kaj klasika kantarto) el Ternopilo, poste flegistino en Kijivo, ĝis la katakomboj de la ŝtaluzino Azovstal en Mariupolo. Dum tragedioj sub la bombadoj de la hospitalo, en mallumo de subuzinaj rifuĝejoj ŝi plu flegis, kiel ŝi povis, la vunditojn, kaj la animojn per kantadoj. Militkaptita de la rusa armeo, ŝi estis kvar monatojn poste liberigita kaj konsiderata kiel heroino.







<u>Dialogo kun ChatGPT</u>

Post kelkaj interŝanĝoj de impresoj pri tiu junulino, la partoprenantoj intervjuis ChatGPT kaj konkrete rekte rilatis kun la roboto. Kaj ĉiuj bele ridegis! Jen transskribo de la interŝanĝo:

EG: Saluton, ĉu estos milito en Ukrainio en 2022?

GPT: Mi ne povas precize diri ĉu estos milito en Ukrainio en 2022. Tio dependas de multaj faktoroj kaj estas malfacile antaŭdiri la estontecon. Tamen, mi povas diri ke la situacio en Ukrainio estas kompleksa kaj ekzistas riskoj por pliigita konflikto. Ĉiam estas grave por la internacia komunumo labori kune por trovi pacajn solvojn kaj malhelpi la ekeston de milito.

EG: Ĉu vi parolas lignolingvon?
GPT: Jes, mi parolas Esperanton. Ĝi estas lignolingvo.
EG: Bela humuro! bonvolu plu ridigi nin. Rakontu ŝercon pri Zamenhof.
GPT: Bone, jen ŝerco pri Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto: Kial Zamenhof ne povis iĝi piloto? Ĉar li ne povis paroli la flugmaŝinlingvon!
EG: Priskribu en 50 vortoj la asocion Esperanto-Gironde kaj ĝian prezidanton.

Al tiu demando venis anglalingva ruĝkolora respondo: Bedaŭrinde pro troa aktiveco en tiu momento la roboto estas superŝutita kaj ne povas respondi.

Postprotokola sekvo:
La morgaŭan matenon (lundon la 23an de januaro) jen la respondo de la roboto GPT:

Esperanto-Gironde estas asocio en Francio kiu promocias la lignolingvon Esperanto. Ĝi organizas renkontiĝojn, kursojn kaj aliajn eventojn por subteni la lernadon kaj uzadon de Esperanto en la Gironde regiono. Prezidanto de Esperanto-Gironde estas persono kiu estas elektita kiel la ĉefa gvidanto de la asocio kaj respondecas pri la organizado kaj administrado de ĝiaj agadoj.

*Marcelo*

ꟸ

**Reago al la eksperimento ChatGPT**

Nu, mi ne dirus, ke la «verkaĵo» de la roboto (p.7) estas «tute senerara»… Ĝi estas ja plibonigebla, laŭ diversaj vidpunktoj (ekz. la famaj bordozaj *fromaĝoj*!!!, kelkaj novbakitaj vortoj: degusti, aprecii…, aŭtoĝiro anst. aŭtopromenado...). Tamen la maŝino estis ja bone nutrita per datenoj.

Cetere mi specife ŝatas la respondon al la demando: «Ĉu vi parolas lignolingvon?» Neintenca humuro, kiu tamen lasas al ni esperon pri la portempa supereco de homoj super tiaj robotoj… Saman reagon mi havis legante la tiel nomitan humuraĵon pri Zamenhof…

Koncerne la teston, pri kiu parolas Jean-Seb (vd. p.14), mi antaŭnelonge aŭdis radioelsendon pri la temo. Fakte, la kreintoj mem de la maŝino baldaŭ proponos (pagajn, kompreneble) servojn por helpi la instruistojn scii, ĉu la taskoj estas ja «homaj» aŭ robotaj. Ni ne maltrankvilu! Ĉio estas jam antaŭvidita far la firmaoj, por ke ni ĉiuj estu katenitaj trudataj uzantoj de iliaj kreitaĵoj…

*Janine*

ꟸ

**Orwell kaj Esperanto** (vd. p.14)

Ĉe la retejo de SAT-Amikaro, oni trovas interesan artikolon de Henri Masson kun informoj pri la ligoj de Orwell kun Esperanto: lia onklino, Ellen Kate Limouzin, estis dum deko da jaroj kunulinon de Lanti (fondinto de SAT). Do pere de ŝi Orwell havis tre proksiman kontakton kun Esperanto. Henri Masson skribas: *Selon Jean-Claude Michéa, le langage est même devenu, avec le temps, un des principaux sujets de préoccupation d'Orwell. En son temps, il s'était intéressé de près aux langues artificielles, notamment à l'espéranto. Il est d'ailleurs infiniment probable que ce soit l'espéranto qui ait suggéré à Orwell ses principales idées sur la simplification des grammaires naturelles.*
https://www.sat-amikaro.org/George-Orwell-et-l-esperanto#nb1 *Janine*

# Artikolo pri René Guillaume en *Libre Pensée Girondine* nro 151

*Sendita de Bernardo*

Les nôtres

## René Guillaume

Nous avons appris de ses enfants le décès de René Guillaume. Notre ami avait adhéré à la Libre Pensée il y a plus de vingt ans.

René GUILLAUME, né le 3 juin 1935 à Longwy, fut réfugié à Hure (Gironde) de 1939 à 1944, lors de la seconde guerre mondiale. Revenu en Meurthe et Moselle, il a été instituteur puis directeur d'écoles ( Villette, Hussigny-Godbrange, Sancy, Pont St Vincent) de 1954 à 1991. Il s'est installé à Hure à sa retraite, en 1991, et a été maire de ce village de 2001 à 2008. Nous avons le souvenir d'un homme discret, tranquille, amical, ferme et déterminé dans ses convictions, toujours très attentif aux questions autour de la laïcité, tant dans ses fonctions publiques (instituteur, maire) que dans sa vie privée. Tant que sa santé le lui a permis il participait à nos réunions, souvent avec son épouse.

René avait appris puis enseigné l'espéranto (langue internationale) depuis les années 80 jusqu'à son décès, et correspondu avec des espérantistes du monde entier.

A son épouse, Elisabeth, à ses deux fils, Philippe et Laurent, nous adressons nos sincères condoléances.

*Libre Pensée Girondine* 4 n° 151 novembre 2022

## RAKONTETO *(Gloria)*

En Rusio
Inspektoro venas en lernejon kaj diras al la infanoj:

- Mi ĝojas respondi al viaj demandoj. Kion vi deziras scii?

Saŝa levas la manon kaj demandas:

- Kial Rusio militas al Ukrainio?

Post mallonga silento, subite, oni aŭdas la sonorilon, kiu indikas, ke estas la paŭzhoro.

Post la paŭzo, denove la Inspektoro parolas al la lernantoj:

- Ĉu vi havas demandojn ? Mi respondos al vi.

Olga levas la manon kaj diras:

- Kial Rusio militas al Ukrainio? Kial la paŭzo okazis 20 minutojn antaŭ la kutima horo? Kial Saŝa ne plu aperis?

## NIAJ KURSOJ

- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collège. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)

- En **CENON** (Mediateko Jacques Rivière), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

# FASCINAJ LUPOJ 1/3



*Joël, Maëva kaj Rose okaze de la festo al Monique la 12an de majo 2019*
La lupo kaj la sep kapridoj - *en la kaprejo de Castelnau-sur-Gupie*

Kiam lupoj estis reinstalitaj en la usona nacia parko Yellowstone (Flavaŝtono) 70 jarojn post sia malapero, okazis la plej rimarkinda «nutrokaskado». Kio estas nutrokaskado? Kaj kiel lupoj vere ŝanĝis riverojn? Tion klarigas **Georgo Monbiot**. Liaj klarigoj rete aperas en diversaj filmetoj. Ekzemple lia 15-minuta TED-prelego *"For more wonder, rewild the world"* (por pli da mirindaĵoj, resovaĝigu la mondon) aŭ la diverslingve subtitolita bela *"How Wolves Change Rivers"* spektita jam pli ol 43milionfoje. *(Ligiloj ĉi-fine.)*

Jen do la teksto de tiu miriga demonstracio. Notindas, ke ĝi verŝajne entenas materialon submetitan al kopirajtoj. Ĝi tamen estas alirebla kaj diskonigebla nur kiel eduka.

## Kiel lupoj ŝanĝas riverojn[1]

«Unu el la plej fascinaj sciencaj malkovroj dum la kvindek lastaj jaroj estis la malkovro de grandskale kaskada transigo. Kaskada transigo estas ekologia procezo, kiu komencas supre de la nutra ĉeno kaj eĥas ĝis plej baze malsupren.
Unu el la plej montrindaj okazis en la usona nacia parko Yellowstone, ekde kiam lupoj estis tie reinstalitaj en 1995. Ni ĉiuj scias, ke lupoj mortigas diversajn bestospeciojn, sed ni malpli scias, ke ili ankaŭ vivigas multajn aliajn.

Antaŭ la reveno de lupoj, malaperintaj antaŭ 70 jaroj, la cervoj senĉese plinombriĝis, ĉar neniu predis ilin en la parko. Kaj spite al la homaj klopodoj provantaj reguli ilian kvanton, ili sukcesis entute detrui la vegetaĵaron. Ili simple formanĝis ĝin.

---

[1] Klodin taksas tiun titolon kiel sofismon. *(La analizo de Klodin' aperos en venonta numero de LEGI)*

Sed ekde kiam la lupoj alvenis, eĉ se nur grupete, ili provokis mirindaĵon. Kompreneble komence ili mortigis kelkajn cervojn, sed tio ne estas la ĉefa rezulto. Ili modifis pli profunde la sintenon de la cervoj. La cervoj ekevitis certajn partojn de la parko, la lokojn, kie ili povus esti facile kaptitaj, kiel gorĝojn kaj valojn. Sekve, tuj regeneriĝis tiuj lokoj. Sur kelkaj zonoj, la alteco de la arboj kvinobliĝis en daŭro de nur ses jaroj. La valodeklivoj rapide iĝis poplo- kaj saliko-arbaroj. Tiam birdoj eknestis. La kantantaj kaj migrantaj birdoj grandkvante plinombriĝis. Ankaŭ kastoroj, ĉar kastoroj ŝatas manĝi arbojn. Kaj ili, kiel la lupoj, estas inĝenieroj de la ekosistemo. Ili konstruas baraĝojn en la riveroj, kiuj ŝirmas ankaŭ lutrojn, kojpojn, anasojn, fiŝojn, reptilojn kaj amfibiojn.

Lupoj mortigis kojotojn, konsekvence pli nombriĝis kunikloj kaj musoj. Sekve aperis pli da falkoj, strigoj, vulpoj kaj meloj. Korvoj kaj agloj sin nutris per la kadavroj postlasitaj de la lupoj. Ankaŭ la ursoj profitis, ĉar ili povis manĝi la berojn sur la nove kreskintaj arbustoj kaj arboj. Kaj la ursoj pligravigis la efikon de la lupoj, mortigante kelkajn cervidojn.

**Kaj jen iĝas vere interese: la lupoj ŝanĝis la sintenon de la riveroj.**

La riveroj iom post iom malpli zigzagis. Konstateblis malpli da erodo. La kanaloj mallarĝiĝis. Kreiĝis lagetoj. Perfekte por sovaĝa vivo. La riveroj ŝanĝiĝis responde al la lupoj. Kaj la kialo estis la plene regeneriĝinta arbaro, kiu stabiligis la riverbordojn malpli eroditajn. Konsekvence la riveroj definitive fluis laŭ daŭre pli firma itinero.

Same, pelinte la cervojn el kelkaj parkopartoj, kaj ebliginte la rekreskadon de la vegetaĵoj borde de la valoj, ankaŭ tie malpli erodiĝis la grundo. Do la lupoj, kvankam malmultnombraj, transformis ne nur la ekosistemon de la nacia parko Yellowstone, tiu vastega regiono, sed ankaŭ ĝian topografion.

Jen kiel lupoj ŝanĝas riverojn.»

*Georgo Monbiot. Tradukis Marcelo.*

*- - - - -(daŭrigota) - - - -*

*Spektu:* https://www.youtube.com/watch?v=ysa5OBhXz-Q
*ekzistas ankaŭ i.a. plaĉa kebeka versio:* https://vimeo.com/197928162 aŭ/kaj https://www.ted.com/talks/george_monbiot_for_more_wonder_rewild_the_world anglalingve.



# ESTRARO
# de
# «ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * * * * * *

**Centre Culturel Château Palmer**
**33150 CENON**

* * * * * * * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBLOUDE**
2 rue Raymond Lavigne
33100 BORDEAUX
Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr**
**aŭ al esperanto.gironde@free.fr**